TEA-BULTENO

11ª JARO **MARTO - APRILO 2008** **NUMEROJ 3-4**

Ne ĉiam kio poste venas signifas progreson.
Alessandro Manzoni, itala verkisto (1785-1873)

Claude Piron: ne forgesebla lingvisto, psikologo, verkisto, esperantisto, homo

Li ne plu inter ni! La 22an de januaro, Claude Piron subite forpasis siahejme en Gland, Svislando.

Lia multfaceta personeco profunde sulkis la vojojn tra nia tuta Esperantujo, sed ne nur ene de tiu nia eta medio. Li grandis en diversaj kampoj: en tiu traduka kaj interpreta - por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko (1956-1961) kaj poste por la Monda Organizo pri Sano i.a. en Ĝenevo, Azio kaj Afriko. Tra la tuta mondo, laborkiale, li vagadis kaj preskaŭ ĉie li trovis tempon por kontakti la lokajn esperantistojn. Invitita en la diversaj aranĝoj, li prelegis, aŭ instruis, aŭ gvidis kurson, aŭ simple kunbabiladis, eĉ kantetis gitarakompane.

En tiu psikologia: li fariĝis psikanalizisto kaj psikoterapiisto, ekde 1969, aŭ, pli bone, kiel li mem difinis sin, «plifeliĉigisto», nome li "helpis - aŭ provis helpi - la homojn fariĝi pli feliĉaj" (el "La bona lingvo", 1989). Piron instruis, de 1973 ĝis 1994, ĉe la Psikologia kaj Edukscienca fakultato de la Ĝeneva Universitato.

En tiu verkada: jam tre frue li ekverkis en Esperanto (kaj ne nur!). Li komencis poeziumadi kaj, en la jaroj 1954-1956, gajnis premiojn en la poezia branĉo de la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1977 aperis la poemaro "Malmalice", kolekto de rimaroj, kelkaj el kiuj tre frutempaj. La pensoj tie vortigitaj parolas pri profunda sentemo kaj lingvoposedo senriproĉa. En 1996 estis eldonita lia unua krimromano de la Ĉu-serio, "Ĉu vi kuiras ĉine?". kiu ricevis nekredeble tujan konsenton de la publiko: la aŭtoro pseŭdonime subskribis la librojn kiel Johàn Valano. Longatempe en Esperantujo oni cerbumadis pri la reala identeco de la verkinto. Sekvis ĝin, "Ĉu rakonti novele?", "Ĉu li venis trakosme?", "Ĉu ni kunvenis vane?".

En tiu esperantisma: li estis unu el la plej elstaraj kaj vervaj pledantoj por Esperanto. Multajn artikolojn li publikigis, en diversaj lingvoj, rilate al monda problemo de plurlingvismo kaj lia argumentado estis ĉiam klare eminenta, digne eksplika, sobra kaj humaneca. Lia verko, plej reprezenta ĉikampe, estas la franclingva "Le défi des langue" (1994), psikoanalizo de la internacia komunikado kaj priskribo de Esperanto kiel reale funkcianta lingvo.

"La bona lingvo" plu kaj plu estas, kaj estos, legenda kaj leginda, ĉar fonto de informoj, de konceptoj, de konsiloj kiu validis hieraŭ, validas hodiaŭ kaj validos morgaŭ. Je la unua eklego, ĝi aperas kiel io aparta, ekde la enkonduko, en kiu li rakontas pri sia *stranga esperantisteco*: nur kelkaj vortoj por ree konsciiĝi kiom granda li estis kaj kiom li mankos inter ni!

"Mia intereso pri lingvoj sendube fontas el mia junaĝa malkovro de esperanto, kiu okazis jene. Mi estis naŭjara, kiam trafis en miajn manojn multlingva presita papereto, kiu akompanis tiuepoke filmojn produktatajn de la firmao Gevaert. Ĝi entenis du partojn: la dua titoliĝis *Garantio* kaj pri la unua mi memoras nur, ke ĝi komenciĝis per la vorto *Senpaga*. Tiu vorto kvazaŭ hipnotigis min, tiom ĝi malsimilis al sia traduko en la aliaj lingvoj. Kaj jen fulme ekkompreno ekbrilis en mi: en mia loka dialekto, ja */sē/* signifis "sen" kaj */pají/* "pagi". Ke en tiu lingvo kun la stranga nomo (stranga per tio, ke ĝi elvokis nek landon nek popolon) la franca *gratuit* esprimiĝas per unu vorto kunmetita el la ideoj "sen" kaj "pagi", tio estis pli ol mirinda: admirinda. Tiusekunde mi enamiĝis al la lingvo. Kaj mi decidis ke iam mi scios ĝin."

Eksterordinara infano, eksterordinara homo!

Memoroj pri amiko: Giancarlo kaj la bobeloj

Dudek jarojn mi havis, pli-malpli. Dum iu IEJ-Seminario, Giancarlo [Ĝankarlo] Sartorio vortigis sian "teorion pri bobeloj". "La homaj estaĵoj - li rakontis al ni, - estas kiel bobeloj, kiuj sin flugtuŝetas, sen iam ajn ververe intertuŝiĝi". "Ĉiumedie, - li daŭrigis, - ni devas klopodi malfermi nian propran bobelon por komuniki kun la aliaj: ni, kiel unuaj, devas preti trarompi tiun muron de malfidemo kaj supraĵemo, karakterizantaj la ĉiutagajn rilatojn kun niaj proksimuloj. Lerneje, laboreje, hejme, en niaj kvartaloj, sufiĉas salutsigno, rideto aŭ simpla afabla gesto por agorde alproksimiĝi al la aliaj."

Nun la bobelo de Giancarlo ne plu ŝvebas…

Tiu tago restos en mia memoro kiel unu el tiuj etapoj tiom grava en mia persona homa vivevoluo. Miaopinie, la plej bona maniero lin rememori estas transdoni al tiuj, kiuj legas miajn vortojn, tion kion saĝulo klarvida instruis al mi.

Se nur plia bobelo malfermiĝus, memoro pri li longdaŭros.

Francesco Amerio *(trad. E. D.)*

Rakontu al mi fabelon...

de Josette Ducloyer, dediĉitan al ŝiaj genepoj

La vera historio de la lupo en la "Lupa Ĉambro" [1]

Mi tuj rakontos al vi la veran historion de lupo, de la ĉi-tiea lupo, tiu kun felo purpura kiel la ĉi-tieaj ŝtonoj, kun iomete da ĉi-tieaj flavoj: "flavoj" en la pluralo, ĉar ĉi tie vidiĝas du flavoj, la intensa flavo de la pika ulekso kaj la pli klara flavo de la balaila genisto.

La ĉi-tiea lupo ĝuis grandan feliĉon, ĉar afable kaviĝis la purpura roko, por fari al ĝi belan dormoĉambron, etan groton nomatan de ĉiam "La Lupa Ĉambro"[2]. La ĉi-tiea lupo kantadis sian ĝojon: "Uuh! Uuuh!". Ĝia kanto eĥiĝis tra la tuta valeto, ĝis la lageto Ozanne kaj ties feino, kiu respondis: "Ozannah! Halelu-u u-ja", ĝis la lageto Boutavent [Butavan], kie ĝi miksiĝis kun la fortega blovo de la loka mastro, la brua furioza vento: "Uuh - Uuh ... Bizz ... bizz, Uuh, Uuh...", eĉ ĝis la vasta lago Tremelin, kie ĝia tremkanto saltetis kareseme sur la ondetoj de malkvieta akvo "Uh - uh - uh - uh - uh ", fine ĝis la lago Careil [Karej] bela kiel eble plej, sur kies akvo la melodio surteriĝis glitante. Iom post iom la kanto ŝanĝiĝis en foran murmuron "Uuh... uuh... uuh... uuh....", ĉiam pli mallaŭtan kiel delikata bloveto.

Abundan nutraĵon nia lupo trovis en erikejo, kaj al ĝi ŝajne mankis nenio. Loĝejon kaj manĝaĵon, kion kroman ĝi povis deziri? Nu, nia lupo verdire ne estis tute feliĉa, ĉar tamen ja mankis io, aŭ pli ĝuste iu, jes iu, bela lupino, kun kiu ĝi fondus familion kaj ekhavus lupidojn, kiuj plenigus ĝian domon per ĝojaj krioj. Imagu ke, ĉi tie, vi aŭdas tiujn multnombrajn "uuh - uuh", kune mildajn kaj akrajn, kiuj eĥiĝas tra la valeto, tiel ĝoje kiel la krio de la kukolo en printempo "uuh- uuh, uuh- uuh, uuh- uuh... "?

Ve! nenio okazis. Vane nia lupo pririgardis la horizonton, vane ĝi vokis al ĉiuj direktoj, neniu lupino respondis. Ĝi ĵus konsciis, ke ĝi nun estas la lasta postvivanto de sia gento, ekde kiam pafiloj aŭdigis sian fatalan pafbruon.

De tiam, eblas aŭdi dum plenlunaj noktoj, la vokon de la ĉi-tiea lupo, tiu kun felo purpura kiel la ĉi-tieaj ŝtonoj, kun iomete da flavoj kiel la ĉi-tieaj uleksoj kaj genistoj. Sed tiu longa, basa voko estas tiu de sola, malgaja lupo, kiu ploras, kaj ploros ĝis la senfina nokto de l' tempo: "Uuuuh!... Uuuuh!..."

[1] Moderna rakonto de Josette Ducloyer (2005), el la libro "BRETONAJ FABELOJ - EN BROCELJANDO", publikigita danke al la afabla permeso de la aŭtoro Jean-Pierre Ducloyer

[2] La "Lupa Ĉambro" reale videblas en ĉarma, samnoma valeto apud la vilaĝo Iffendic [Ifendik]



Esperanto post kvindek mil jaroj

Vojaĝe per la satelito Keo - Projekto de la 21ª Jarcento

Invito al ĉiu ajn terloĝanto partopreni en la spaca aventuro de Keo

Eblas sendi, pere de la satelito Keo, mesaĝon al estontaj teranoj. Ĝi revenos al la tero post 50 mil jaroj kaj kunportos al niaj pranevoj ĉiujn mesaĝojn, kiujn ni hodiaŭ konfidis al ĝi. Kion ajn eblas mesaĝi: priskribi la propran vivon, kundividi pensojn kaj ideojn, transdoni proprajn spertojn, rakonti aspirojn kaj revojn … kaj sin prezenti en unu aŭ pli da linioj (maksimume 4 paĝoj, 6 mil karaktroj, inkluzive de interspacoj). Ĉiuj mesaĝoj, sencenzure kaj sendistinge, ensatelitiĝos.

Ekde kiam Keo orbitiĝos, la mesaĝoj, kies kopion, anonimstate, oni konservos sur la Tero, estos libere alireblaj ĉe la ttt-ejo de Keo, kaj kiu ajn povos eklegi la mesaĝitajn skribaĵojn de la aliaj, kiuj multdiferencos pro la kulturo, la lingvo, la kontinento… Tiel oni havos la eblon "esplori" la pensojn de aliaj homoj kiujn neniam oni renkontos. Skribante mesaĝon por Keo, ĉiu povos iom mediti je tutmonda dimensio, malfermiĝante, liberamense, al dialogo kun aliaj kulturoj. Sociologiaj analizoj de la mesaĝoj estos faritaj por klopodi respondi al ĉi du demandoj: "Kiuj ni estas?" kaj "Kion ni atendu de ni mem?"

Do, iru al http://www.keo.org/it/pages/introfr.html , ĝin vizitu kaj poste sendu vian mesaĝon!

Inter la diversaj asociiĝintaj institucioj, apogantaj la projekton, estas la Eŭropa Spacagentejo, Louvre, Unesko, Radio France Internationale kaj multaj aliaj.

Trovu tempon por labori:
jen la prezo de l' sukceso.
Trovu tempon por pensi:
jen la fonto de l' potenco.
Trovu tempon por distriĝi:
jen la sekreto de eterna juneco.
Trovu tempon por legi:
jen la bazo de saĝeco.
Trovu tempon por amikiĝi:
jen la vojo al feliĉo.
Trovu tempon por revi:
jen la aspiro al grandaj idealoj.
Trovu tempon por ami kaj esti amata:
jen la privilegio de l' dioj.
Trovu tempon por rigardi ĉirkaŭ vi:
tro kurta la vivo por egoismi.
Trovu tempon por rideti:
jen la muziko de l' animo.

ANTIKVA IRLANDA BALADO

ĈU ESPERANTO NOBELPREMIIĜOS?

Temp' estas de *Oscar-award* [oskar-aŭard = oskar-premio]. Tiu fama statueto kiu – en Los Angeles (Usono) – estas donita al valora filmo aŭ al tiuj reĝisoroj, ĉefroluloj, aktoroj, scenredaktoroj, muzikistoj, ktp ktp, indaj pro ilia specifa kontribuo al plilevigo de la artnivelo ĉe Kinematografio.

Grava premio por ĉiu el tiu amaso da profesiuloj en la kinarto.

Tiun oran statueton ili ĉiuj alstrebas, intence aŭ ne, kiel kronado de persona kariero.

Sed preskaŭ same valoras kandidatiĝi al la premio – usonlingve "nomination" – ĉar simile tio estas atesto de estimo, de prikonsidero kaj ĝi eĉ plivalorigas la verkojn en kiuj rolas la kandidato.

Multas en la mondo tiaj premioj: pri literaturo – *Premio Strega*, *Prix Femina* k.a.; pri ĵurnalismo – *Pulitzer prize*; pri fotografio; por popolkantistoj – *Grammy* – kaj pluraj aliaj, ĝis la plej fama *Nobel*.

Ĝin starigis la kemiisto kaj industriestro Alfred Bernhard Nobel, svedo, inventisto de dinamito. Per la koncernaj patentoj, li amasigis grandegan posedaĵon, kiun li testamentis al specifa fondaĵo *Nobelstiftelsen*, celante atribui ĉiujare – pere de la Reĝa Akademio de Sciencoj en Svedio – 5 egalvalorajn premiojn al elstaraj homoj atingintaj maksimume gravajn rezultojn en la kampoj de fiziko, kemio, medicino, literaturo, paco. La unua aljuĝo ekis en 1901 kaj de post 1969 estis aldonita kroma premio por ekonomiko, kiun iniciatis la Sveda Banko.

Simile al ĉiuj aliaj, ankaŭ kandidatiĝo al Nobel-premio pruvas apartan prikonsideron kaj altan estimon al la koncernatoj. La nomojn de kandidatoj proponas diversaj mondaj institucioj: por paco nuntempe *PRIO – Peace research international organization* [internacia organizo pri paco-esploroj]. Ĉijare, indaj por la aljuĝo de venonta oktobro, ĝi atentigis pri: José Manuel Durao Barroso, portugalo, prezidanto de Eŭropa Komisiono, la alĝera prezidanto, Abdelaziz Boiteflika, la iama kanceliero Helmut Kohl, patro de la germana reunuigo, kaj krome la lingvo "esperanto".

Estas vere trafa tiu ĉi rekono al Lingvo Internacia de Zamenhof kiel propaca rimedo tra interkompreniĝo de la diverslingvanoj, aparta aspekto de la "interna ideo". Kaj precipe estas honoriga tiu samrangiĝo kun homoj, gajnintaj la pacpremion. Ni citu nur kelke da: Dalai Lama, patrino Tereza el Kalkuto, Martin Luther King, Albert Schweitzer kaj Bertha von Suttner, aganta antaŭ la Unua mondmilito kaj subtenanta esperanton, kiu kutimis diri: «paco kaj esperanto estas kuzoj». Kaj same fiere menciindas la institucioj jam premiitaj kiel: UNHCR, Amnesty International, UNICEF, Internacia Komitato de Ruĝa Kruco kaj aliaj. Kaj ni ne forgesu krome la sep homojn, Nobel-premiitojn en pluraj kampoj, kiuj esprimis sian apogon al esperanto: prof-ro William Ramsay, prof-ro Joseph J. Thomson, prof-ro Charles Richet, d-ro Yukawa Hideki, d-ro Daniel Bovet, Salvatore Quasimodo, prof-ro Reinhard Selten.

Se tiuj estis la estimantoj de la internacia lingvo, ĉiam kun fiereco ni povas alfronti la kontraŭulojn, tiujn kiuj petole diradas: «esperanto estas artefarita lingvo», «ĝi ne havas literaturon», «esperanto ne havas popolon» ktp ktp.

La internacia lingvo entenas ege altajn valorojn, aldone al propraj kvalitoj kaj lingvaj karakteroj: tia certeco ĉiam devas subteni nian konvinkon kaj nian agadon.

Ne forgesu.

VIGLO

Rat-Man, la plej granda heroo vivanta de MARVEL, parolas Esperanton: oni fakte eldonis unikan numeron de la fama komikso en Esperanto. La eldonaĵo enhavas eĉ 5 historiojn de Rat-Man tradukitaj en Esperanton, unu mallongan historieton omaĝ' al rathomo, kaj iujn informojn pri la Lingvo Internacia (eble multingve)... bonega okazo por riĉigi propran komikskolekton, por ekkoni Esperanton, por uzi kiel studilon por gelernantoj aŭ kiel donacon por komiksema amiko ktp. La kosto de la ĉefverko estas 6 €; ekde 5 ĝis 9 ekz., po 5,5 €, kaj ekde 10 ekz., po 4,5 € (sendokostoj ne inkluzivitaj).

Ideo kaj projekto de Daniele Binaghi - ttt-ejo - www.pecorelettriche.it

Etaj informoj!

Napoli - "SEMINARIO: 2008 Internacia Jaro de Lingvoj - ĉu pliaj ŝancoj por Esperanto?" (18-20/04/08) Informoj ĉe Nicolino ROSSI nicolino.rossi@esperanta-napolo.info; rete: http://esperanto-italia.it/renkontoj.htm

Torino - Ekspozicio "Esperanto: interkultura lingvo - 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio" de la 5ª ĝis la 18ª de aprilo 2008 ĉe *Centro Interculturale, Corso Taranto 160*. Post la sabata inaŭguro, okazos kelkaj prelegoj pri la temo kaj ankaŭ la transdono de la premioj al la gajnintoj de la Literatura Konkurso "Renato Pennazio". Baldaŭ informoj pli detalaj pri la programo.

Tanzanio - La esperantistoj en tiu rifuĝejo aranĝas kursojn bazajn kaj perfektigajn pri Esperanto. Nun ili petas ke la tutmondaj esperantistoj "...subtenu nian klubon kaj nian lernejan klason per kelkaj malnovaj libroj, revuoj, insignoj...". Lernolibroj estu prefere en la franca aŭ angla lingvoj. Jen la adreso: Fuajo Jeannot - Nauta Refugee Camp c/o Icrc/Nauta Antenna - P.O. Box 433 - Kigoma - Tanzania

Roterdamo - Ĝis nun 1239 esperantistoj el 60 landoj aliĝis al la 93ª UK (19-26 julio 2008). Kun plej multe da aliĝoj Francio transprenis de la gastigonta lando Nederlando la unuan lokon.

Kubo - ĉu post 20 jaroj denove UK en Kubo? Osmo Buller, invitite de KEA, komence de februaro esploris la kondiĉojn okazigi UK-n en Havano, en la jaro 2010. Entuziasma estis la sinteno de la diversaj instanco-funkciuloj, kaj, plej kredeble, same entuziasmaj estos ĉiuj tutmondaj esperantistoj, inter kiuj unuavice mi mem, ree havi la okazon viziti tiun mirindan insulon kaj ĝui la kunestadon de la verve vigla kuba samideanaro!

Rezultoj de la 2ª Internacia Konkurso Kristnasko: Mia Bildo pri ĝi

Alvenis al Trieste 99 ellaboraĵoj el la jenaj landoj: Bosnio-Hercegovino, Francio, Germanio, Irlando, Italio, Kroatio, Litovio kaj Vjetnamio. La aŭtoroj aĝis inter 6 kaj 14 jaroj. La plej multenombra partopreno, ankaŭ ĉifoje, estis la kroata.

Ekde la 15ª ĝis la 29ª de decembro 2007, vizitis la ekspozicion pli-malpli 200 personoj, el kiuj pluraj esprimis, per skriba voĉo, sian ŝaton de la diversaj verkoj. Laŭ la indikoj de vizitintoj kaj ĵurio, la premioj estis tiel aljuĝitaj:

Desegnaĵoj

Kat. A) David MANDARIĆ (6 j. kaj duono) – Mostar, Bosnio kaj Hercegovino;

Kat. B) Filip KELAVA (10 j.) – Ludwigsburg, Germanio;

Kat. C) Marijana TOLE (13 j.) – Široki Brijeg, Bosnio kaj Hercegovino.

Rakontoj: ne aliuĝita la premio.

Manlaboraĵoj

Aušra VALUNTYTĖ (12 j.) kaj Agna DAGYTĖ (12 j.) – Mezlernejo en MEŠKUIČIAI, Litovio.

La gajnintoj ricevis la premiojn, konsistantajn el libroj, KD-aj kursoj pri Esperanto, ŝlosilringoj, puzloj kaj aliaj, depende de la koncerna aĝo, dum al ĉiuj konkursintoj estis senditaj partoprendiplomoj.

Projekto "Infanlibro"

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel pontolingvo. EU ĝin financos per 64 000 eŭroj: la infanlibroj, per Esperanto, estos tradukitaj inter la bengala, itala, kroata kaj slovena lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, aprobita de kultura agentejo de Eŭropa Komisiono, estis ellaborita por KEL de Zlatko Tišljar kaj en ĝi partoprenos kiel partneroj EDISTUDIO el Pisa (Italio), INTER-KULTURO el Maribor (Slovenio) kaj la barata eldonasocio SAMATAT PRAKASHAN - SAMATAT SANSTHA (Kalkato).

Ĉiuj partneroj (barata, itala, kroata kaj slovena) tradukos el siaj lingvoj unu literaturan infanlibron al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj ĉiu el la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron al sia nacia lingvo.

Kiam ĉiuj eldonitaj, oni distribuos la librojn en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokonkurson inter la infanoj. La plej bonaj infanverkoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon. La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. La projekto estos efektivigata inter majo 2008 kaj majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas Eŭropa Komisiono.

(fonto: www.liberafolio.org/2008/eubaratalibro)

Marta Programo

4 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: pristudo de programo dumkongresa
7 - vendredo	20h00 - Kartludado: rumio aŭ pokero?
11 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: pri materialo disdonenda al kongresanaro: kio, kiom, kostoj ks
14 - vendredo	20h00 - "Sano kaj bonfarto" - sugestoj kaj konsiloj (itallingve)
18 - mardo	20h00 - Enigmoj en esperanto
21 - vendredo	Antaŭpaska kunestado!
25 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009
28 - vendredo	**20h00 - Monda Tago pri Poezio** - prof-ro Paolo Alessi, prezidanto de CENTRO UNESKO TS, prezentos sian lastan libron

Aprila Programo

1 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009
4 - vendredo	20h00 - *Lecturae Dantis* esperante, itale, triestadialekte
8 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009
11 - vendredo	20h00 - **Itallingva prelego** de prof-ro Dario Bazec pri la semidaj lingvoj
15 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: pridiskuto de la programo
18 - vendredo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: ekskursoj - kion ni proponas, kien, kostoj de aŭtobusoj, tagmanĝo, vizito surloka ks
22 - mardo	**20h00 - Monda Tago pri la Libro: niaj eldonoj**
25 - vendredo	*Sidejo fermita*
29 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2008 en Poznan

60ª Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio Poznan, Pollando - 17-24 majo 2008

TEA partoprenos la Kongreson per laŭeble multenombra delegacio, kiu havos la gravan taskon prezenti Trieston kaj ties ĉirkaŭaĵojn al la tie kunvenonta kongresanaro.

Kial? Celo estas konvinki la plej grandan parton tuj aliĝi kaj partopreni en 2009 la Jubilean Kongreson, okazontan en Triesto de la 23ª ĝis la 30ª de majo.

Detalajn informojn, aliĝilojn, programon pri kunvojaĝado oni povas ricevi de la sekretario, prezidanto, kasisto…, sed rapidu, ĉar jam tempo estas!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; noredv@tele2.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Ridu sanigas

Tio okazis en la cara Ruslando. Reuven (Ruben) kaj Ŝimeon (Simono) estas fratoj. Ili kverelas pri la heredaĵo de sia patro, kiu mortis kaj postlasis sian gastejon "al unu el ili". Sed ne estis klare menciita en la testamento al kiu el ili ...
La juĝisto devos morgaŭ verdikti, kiu el la du heredos la gastejon. Diras Ruben al sia advokato: "Eble mi sendu donacon al la juĝisto?" Respondis la advokato: "Nepre ne faru tion, ĉar tiu ĉi juĝisto estas tre honesta homo, kaj se vi sendos al li donacon, li ekkoleros kaj decidos malfavore al vi!"
Venis la tago de la juĝo kaj la juĝisto verdiktis favore al Ruben. Advokato: "Bone vi faris obeante min. Se vi sendus donacon al la juĝisto, vi certe ne gajnus la heredaĵon."
Ruben (ridante): "Bone mi faris malobeante vin: mi sendis donacon je la nomo de Simono…"
Ĉino en Brooklyn. Ekde la 19ª jarcento loĝis amaso da judoj en la Novjorka urbero Brooklyn. Multaj el ili estis enmigrintoj el Eŭropo, kiuj parolis nur (aŭ ĉefe) la jidan lingvon. Foje venis kliento al juda restoracio en Brooklyn. Li estis tie tre bone servita de ĉina kelnero, kiu parolis flue la jidan lingvon, tute mirinde. Kiam poste pasis apud lia tablo la posedanto de la restoracio, demandis lin la kliento (jide, kompreneble): "Kie kaj kiamaniere via ĉina kelnero lernis la jidan lingvon?" Respondis la estro: "Silentu, mi petas! Li kredas, ke ni instruis al li la anglan lingvon!"
Fiereco. Rabeno (reformisma, kompreneble) partoprenis solenan urban festenon en Usono. Apud la sama tablo sidis anglosaksa viro, kiu fieris pri sia origino: "Unu el miaj praavoj subskribis la Deklaron pri Sendependeco!" Reagis la rabeno: "Ho,vere granda honoro! Kaj unu el miaj praavoj subskribis la dekalogon.*"

* **Dekalogo**: la dek precipaj ordonoj religiaj, kiujn Moseo ricevis de Dio sur la monto Sinajo.

Fonto: nova listo de abo(me)nantoj de judaj humuraĵoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, ene de Paska ovo, bela, kun granda buntcelofana floko, anstataŭ iu stulta, forĵetenda surprizo, mi trovis historieton, pripensindan kaj diskoniginda.

AZENO, HUNDO KAJ SIMIO

Komence, la Kreinto estigis la azenon kaj diris al ĝi: "Vi estu azeno, vi ĉiam senĝeme laboros, de tagiĝo ĝis sunsubiro, surgrope ŝarĝojn portanta. Vi paŝtados sur herbejo; tute ne saĝa vi estos, kaj vivos ĝis 50 jaroj. Vi estu azeno". La azeno respondis al Li: "Mi estos azeno, sed kvindek vivojaroj troas por mi, donu al mi nur dudek". Kaj Dio jesis!

Poste la Kreinto modlis hundon, la vivon enblovis en ĝin kaj diris: "Vi estu hundo. Vi gardos la domon de l' homo kaj estos lia plej bona amiko. Vi manĝos, kion al vi oni ĵetos, kaj vivos 25 jarojn: vi estu hundo".

La hundo alparolis Lin: "Ho, Kreinto! 25-jara viv-daŭro troas por mi: donu al mi nur dek jarojn, eĉ tio ja sufiĉas!". Kaj la Kreinto bonvolis kontentigi ĝin.

Sekve, Dio estigis la simion, kaj donante vivon al ĝi: "Vi estu simio – Li diris. – Vi saltos de unu brancho al alia kiel klaŭno, ĉiujn amuzante, kaj vivos 20 jarojn. Vi estu simio". "Ve! – tiel reagis la simio – ho, pezas tiom da jaroj! Donu al mi nurajn dek". "Konsentite!" diris la Kreinto.



Finfine Li kreis la homon kaj diris al li : "Vi estu homo! La nura rezonkapabla estaĵo sur la tero. Vi uzos vian inteligentecon por superregi la bestojn, vi mastros la tutan mondon kaj vivos ĝis dudek jaroj. Vi estu homo". La homo respondis: "Sinjoro! Mi estos homo, sed 20 vivojaroj ŝajnas al mi envere malmultaj. Bonvolu doni al mi la 30 jarojn, kiujn la azeno rifuzis, tiujn 15 malakceptitajn de la hundo kaj la ceterajn 10 jarojn, ne deziritajn de la simio". Kaj tiel faris la Kreinto.

De tiam, la homo vivas 20 jarojn kiel viro, edziĝas kaj travivas 30 jarojn kiel azeno, laborante kaj suŝultrigante la ŝarĝon de sia familio. Poste, kiam la filoj elhejmiĝas, dum 15 jaroj vivas kiel hundo, gardante la domon kaj manĝante, kion ajn oni bonvolas doni al li. Fine, li maljuniĝas, emeritiĝas kaj travivas la lastajn 10 jarojn kiel simio, saltante de hejmo al hejmo, de filo al filo, kaj klaŭne turniĝadas por amuzigo de l' nepoj.



Trad. de Viglo

Mi devas rememori ke...

1) Kurso unua-grada okazas ĉiun merkredon je la 18ª horo.

2) Kurso dua-grada okazas ĉiun mardon je la 19ª horo.

3) La Koruso "Verdaj Anĝeloj" ekzerciĝadas, ĉiuvendrede ekde la 18ª horo! Estas ankoraŭ tempo por aliĝi al la kantema grupo!

4)

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il 5 per mille dell'imposta stessa a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2006 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320